

[noto] fonto: "budhana kuriero", n-ro 2518-1, 1975 (B.E. 2518)

reapero: "La Esperanta Budhano", n-ro 11, 2012 (B.E. 2555)

dikaj literoj ĉi tie montras en la originala fonto duone-substrekitajn literojn.

La aŭtoro Franz Morawetz estis sekretario de BLE siatempe.

La Kvar Veroj

Franz Morawetz, Danlando

La kvar veroj estas la fundamento de la Budha Instruo. En la budhismo oni povas trovi diversajn temojn, diversajn ideojn laŭ la evoluoj en la diversaj landoj, laŭ la diversaj epokoj, sed la kvar veroj ĉiam estas la bazo, almenaŭ la elirpunkto komuna. Mia prezento estas per hodiaŭaj vortoj. Ekzistas multaj tekstoj en la palia aŭ sanskrita aŭ alia lingvo el la tiama tempo; ekzistas iliaj tradukoj (malsamaj) kaj ankaŭ komentoj kaj klarigoj laŭ la diversaj cirkonstancoj. Tial estus bone, ankaŭ tiujn tekstojn rigardi, kiuj estas al la origina prezento pli proksimaj. Necesas preni nacilingvajn tradukojn, sed verŝajne ankaŭ eblos preni tiujn gravajn tradukojn en Esperanto.

Per tio mi nur volas diri, ke tiu mia prezento ne estas la finfina. Necesas, ke la leganto ĉe plia intereso ankaŭ rigardu la aliajn prezentojn. Tamen mi klopodas montri la bazon de la Budha Instruo en por ĉiu komprenebla maniero, sen antaŭkondiĉo jam scii pli pri religiaj aŭ filozofiaj temoj.

Kial prezentiĝas nur kvar veroj? Ja ekzistas multegaj veroj. Ne nur laŭ la kvanto, sed ankaŭ laŭ la direkto, eĉ ankaŭ laŭ alia klasifiko, ekz. lasta vero, plej alta vero.

Budho mem tion sciis kaj ankaŭ diris, ke ekzistas multegaj veroj, tiom kiom da folioj en arbaro. Pri tiuj multaj aliaj veroj sed li ne parolas, li nur prezentas tiujn kvar, ĉar ili estas gravaj por la homoj, gravaj por helpi sur la vojo al la feliĉo. La feliĉa aŭ kontenta stato de la homo ja estas lia celo.

Ĉu oni transprenu tiujn prezentitajn verojn, faktojn aŭ rekomendojn, ĉar li, Budho, ilin diris al ni? Ne, ankaŭ laŭ liaj vortoj la aŭtoritato ne estu decida, ke ni transprenu tiujn rekomendojn. Ĉu profesoro, ĉu sanktulo, ĉu eĉ Budho mem, tio ne validu, sed ni mem pripensu la aferojn, kaj nur post nia ekkono, post nia konstato ni decidiĝu, ĉu ni tiujn kvar verojn transprenu por ni.

Pri kio temas en la kvar veroj? Ne temas pri ia ĉielo, ne temas pri iaj dioj, ne temas pri iaj filozofiaj ideoj, sed nur pri la ekzistado de la simpla homo en la mondo. Kaj

li ne estas konsiderata nur kiel unuopulo aŭ solulo, sed en sia kunvivado en la socio kun la aliaj estaĵoj en tiu ĉi mondo.

La unua vero do mencias resp. konstatas lian situacion en la mondo. Ĝi mencias kelkajn faktojn.

Unue li naskiĝas, kreskas, pliaĝiĝas, malsaniĝas, maljuniĝas kaj mortas. Due li kunvivas ankaŭ kun nesimpatiaj homoj aŭ li deziras kunesti kun simpatiaj homoj, sed tio ne ebas. Trie li ofte ion deziras, kaj ofte tiuj deziroj ne plenumiĝas, estas neplenumblaj.

Cetere oni povas ankaŭ aliajn faktojn trovi, sed tiuj tri grupoj sufiĉas por montri la nekontentigecon de la homa estado en la mondo. Certe ekzistas homoj, al kiuj io plaĉas en la mondo, certe estas ankaŭ kalkaj faktoj belaj, ĝuaj, plezuraj. La homo mem prijuĝu, post sincera konstato, ĉu la vojo de la naskiĝo al la morto estas plezura, ĉu la kunvivado en la malsanoj estas agrablaj, aŭ due ĉu la kunvivado en la socio ĉiam estas agrabla, egale ĉu oni rigardas la kunvivadon en la familio aŭ en la stato eble kun la diversaj partioj. Aŭ ĉu trie la neplenumo, la neplenmeblo de siaj deziroj estas laŭplaĉe? Certe kelkaj homoj eble estas ĉiam kontentaj aŭ trovas ĉion bona, sed ĝenerale tiuj faktoj menciitaj estas neagrablaj, nekontentiga, ofte doloraj, mizeraj. En tiu ĉi senco eblas diri, ke la homa vivo (vidu tiujn tri menciojn) estas mizero, ĝi donas senton de malfeliĉo, de mizero.

La dua vero klarigas aŭ montras la kaŭzon de tiu ĉi mizero. La kaŭzo de tiu mizero estas la volo de la homo, lia volego vivi, aŭ per alia vorto, lia soifo, lia soifego. Ne temas pri la nura spirado de la homa korpo, aŭ pri la manĝado aŭ trinkado por vivi, sed pri la intenca, ĉiudirekten organizita volego por vivi, por ĝue vivi, nepre. Ĉiu homo ja iom volas vivi, resti en la mondo, havi ne nur sian kontentigan postenon ĉi tie, sed ankaŭ sian bonan sekuran situacion ĉi tie, sekura ankaŭ kontraŭ la deziroj de la aliaj homoj.

De kio venas tiu dezirego vivi? Kaŭzas ĝin la malĝusta opinio pri la mi. Ekzistas ja en ĉiuj lingvoj tiu mi, kiu ja validas por ĉiu. La mi estas la unua persono, kaj tiu gramatika ideo (ne nur ĝi) kondukas al la (malĝusta) opinio, ke ankaŭ la homo estu la unua antaŭ la aliaj. Kreiĝis tiu malĝusta opinio pri la mi, ke oni volas nur sin mem en la unua vico, en la nepra sekureco, kaj tio sekvigas malamikecon (de unu al la aliaj, de aliaj al la unu) kaj havemon. Oni ja nepre volas, devas havi laŭeble plej multe por havi la sekurecon kaj plezuron por la (malĝuste opiniita) mi.

Do, la malĝusta opinio pri la mi kun la malamikeco (aŭ malamo) kaj kun la havemo estigas tiun volegon, tiun deziregon vivi, kiu kaŭzas la mizeron de la unua vero.

La tria vero montras, ke laŭ la leĝo de kaŭzo kaj sekvo (ĉio ĉi tie havas ian kaŭzon, ĉio havas ian sekvon, aŭ sen kaŭzo ne estas ia sekvo) povas foriĝi la mizero de la unua vero. Per aliaj vortoj, se oni forigas tiun malĝustan opinion pri la mi kaj per tio la deziregon je vivi, tiam ne plu estas kaŭzo de la mizero, per tio ankaŭ estas forigita la mizero, atingita la stato de feliĉo.

La kvara vero montras, kiamaniere oni forigu tiun malĝustan opinion pri la mi, la malamon kaj la havemon, kaj per tio la deziregon, la volegon vivi, por atingi la forigon de la mizero, por atingi la staton de feliĉo. Tiu rekomendo de konduto, de sintenado ankaŭ havas en la Budha instruo la nomon Okera Vojo.

Ofte oni ankaŭ legas aŭ aŭdas, ke nur tiu Okera Vojo aŭ nur kelkaj eroj estas la ĉefaĵo de la instruo, laŭ diversaj skoloj; sed tiuj ok eroj, tiu rekomendo de la Okera Vojo ja nur estas kvazaŭ ia recepto de kuracisto por forigi la malsanon kaj atingi la sanecon.

Unue rekomendiĝas ĝusta atento. La unua paŝo estu sincere laŭfakta konstato, tio estas, la ekkono de la faktoj en la mondo. Oni do ĝuste atentu, observu sin mem kaj sian ĉirkaŭon, oni akiru scion pri si mem, pri la ĉirkaŭaj homoj, pri la ĉirkaŭaj faktoj. Oni ne nur lernu aŭ legu, kio estas en la mondo, kio estas la homo, tiu "mi", sed oni ankaŭ per propraj spertoj kaj travivaĵoj atingu tiun scion, tiun ekkonon. La observado de la mi kaj de la ĉirkaŭo estas kvazaŭ pri la tuta regiono de la unua vero.

Due rekomendiĝas la ĝusta decidiĝo laŭ tiu ekkono, laŭ tiu ĝusta observado. Oni formu, direktu sian konduton, sian sintenon laŭ tiu ekkono de la unua ero. Kaj kompreneble oni ne nur decidiĝu, oni ankaŭ efektivigu tiun decidon, faru tion, kion oni decidis.

Tiuj jam prezentitaj du eroj fakte povas sufiĉi por progresi sur sia vojo al la feliĉo. Ĝusta ekkono (scio) kaj ĝusta decidiĝo kune estas la saĝeco. Scio sola ne sufiĉas. Laŭ tiu metodo de la unuaj du eroj (ĝusta priatento kaj ĝusta decidiĝo) oni ja formu sian vivon en la socio.

Trie. La vivo en la socio kune kun aliaj homoj baziĝas sur bona kontakto. La plej ofta kontaktilo estas la lingvo, la parolado. Do oni ĝuste parolu. Tio postulas anataŭan ĝustan pripensadon.

Kvare montriĝas gravaj aliaj punktoj de la kunvivado. Tiu estas kvazaŭ regularo, tamen ĝi ne estas devigo de ia dio, postulo aŭ ordono de ia pli alta instanco, sed oni mem ĝuste observu la cirkonstancojn, kaj formu mem laŭ tio sian konduton. Do oni mem decidiĝu koncerne mortigon de aliaj estaĵoj, koncerne prenadon de ne propraj aĵoj, koncerne seksan sintenon, koncerne mensogadon kaj kalumniadon, koncerne alkohol-trinkadon. Ne ekzistas regularo, en kiu oni diras "vi devas" aŭ "vi ne rajtas", "estas permesata", aŭ "malpermesata", sed ĉiu mem diru laŭ sia decido "mi rezignas", "mi decidas ne fari". La kvara ero do koncernas la propran konduton en la mondo, kontraŭ ĉiuj estaĵoj.

Kvine. Sed tiu nura propra aŭ persona sinteno ne multe helpas, se la profesia agado en la socio tion kontraŭas. Tial ankaŭ la profesio estu laŭ priatento kaj pripenso ĝustaj, kaj ne kontraŭu la decidojn de la kvara ero. Ĝi helpu al la bonfarto, al la feliĉo de la aliaj.

La lastmenciitaj tri eroj (trie, kvare, kvine) ĉefe pritraktas la vivon, la sintenon de la homo en la socio. La sekvantaj eroj (sese, sepe, oke) pritraktas la sistemon, la teknikon, la kampon de la memregado, do kontraŭe al la konduto (kunvivado kun aliaj) la mem-decidiĝon, memformiĝon.

Sese rekomendiĝas post observado de sia propra agado ne tuj salti al bonaj agoj, sed unue eviti siajn malbonajn agojn. Nur tiam eblas plibonigi sin, post forigo de la malbona konduto. Ekzemple etaj mondonacoj ne tiel multe povas helpi ol ĝusta sinteno. Alia ekzemplo el la plantkulturado: oni ne tuj semu la plej bonajn semojn, oni unue forigu la ĝenajn plantojn, oni preparu la kampon aŭ la ĝardenon, oni provu la belajn aŭ bonajn (deziritajn) plantojn, kaj nur post tio oni agu laŭ la ĝusta kulturado. Paŝon post paŝo, sen nehelpaj saltprovoj.

Sepe montriĝas, kiel veni al ĝusta atentado. Tie ĉi ofte oni uzas la vorton meditado (kvankam laŭ la diversaj skoloj la vorto meditado ankaŭ uziĝas por la oka ero). Tie ĉi montriĝas, kiel (kaj kial) atingi trankvilon, kiel regi sian pensaparaton, sian pensadon, ofte (kaj unue) per spiroobservado, kiel elŝalti ĝenan pensadon, ĝenajn pensojn, kel koncentriĝi. Ekzemploj montras, kiel veni al la ĝusta observado de sia spirado, de sia spiraparato, de sia korpo, de la kompleta korpo (do ankaŭ de la spirito), de la stato aŭ estado de tiu korpo en la mondo (vidu la unuan veron).

Oke tiu koncentrita pensado povas iĝi la enprofundiĝo en sin mem, do veni al trankvilo, al nenionpensado, kaj al la lasta alcelita stato, al la ekvilibro. La ekvilibro

pleje gravas por la homa sinteno en tiu ĉi mondo. Ĝi baziĝas ja ankaŭ sur la ekkono, la mondo estas tia.

Pluaj ebloj ankaŭ ekzistas, kiuj montras la limojn de nia ekkono resp. la ekkonon de certaj senlimecoj.

Resume mi ripetas, ke la **unua vero** montras la faktojn de nia nuna vivo en la mondo kaj ĝian nekontentigan staton, ĝian mizeron; la **dua vero** montras ties kaŭzon, la vologon aŭ deziregon vivi, kiu devenas de la malĝusta opinio pri la mi kun la malamo kaj la havemo; la **tria vero** diras, ke per forigo de tiu kaŭzo foriĝas la sekvo, la mezero; kaj la **kvara vero** enhavas la okeran vojon, la erojn, kiuj tion ebligas, ke oni, simpla homo, forigu tiun kaŭzon kaj atingu per tiu vojo, per la paŝado sur tiu vojo la forigon de la mezero, la feilĉan staton en la vivo ĉi tie en la mondo.

Ĉe mia prezento de la kvar veroj de la Budha Instruo mi devas ankaŭ mencii, ke ekzistas laŭ la evoluo diversaj skoloj, diversaj direktnuancoj. Niaj legantoj pro tio certe konstatas, ke ekzistas ankaŭ aliaj prezentoj, aliaj manieroj, tiun fundamenton de la Budha Instruo montri al la legantoj. Tiujn diferencojn mi ne povis ĉi tie mencii kaj klarigi (ekz. la vivo estas mizera, aŭ, la vivo estas mezero). Ankaŭ necesas diri, ke kelkfoje oni uzas aliajn malsamajn vortojn por mencii la saman fakton. Ne nur la naciaj hodiaŭaj lingvoj estas diversaj, ankaŭ en nia lingvo eblas, la saman aferon diri per aliaj vortoj. Tial antaŭ ĉio gravas, ke la leganto mem konstatu kaj pripensu la faktojn. La faktoj, la veroj gravas, la prijuĝado, la decidiĝo de la leganto gravas, kaj ne miaj vortoj.

Ankaŭ necesas, la kvar verojn **ne nur teorie** prezenti, sed ankaŭ montri praktikajn ekzemplojn, kiel oni komprenu tiun prezenton, ĉu la veroj havas signifon por ĉiu leganto. Tial necesas, en tiu nova revuo ankaŭ montri praktikajn ekzemplojn el la ĉiutaga vivo de niaj legantoj, ke faktoj de la ĉiutaga vivo apartenas al la instruo de Budho, estas korekteblaj per ĝiaj konsiloj, ke la vivo de simpla homo estas pritraktata per la instruo, ke ĝi validas ne nur dimanĉe aŭ festtage, sed ĉiutage, ĉiam, ĉie.

Mi esperas, ke la kontakto inter la legantoj kaj la Budhana Kuriero helpas al tio, ankaŭ montri hodiaŭajn ekzemplojn el la ĉiutaga vojo de simpla homo.

Kas **fine mi esperas**, ke tiu prezento de la kvar veroj, de la fundamento de la Budha instruo kune kun pluaj detaloj, kun tradukoj de originalaj tekstoj, oficialaj klarigoj kaj komentoj, kun pluaj prezentoj de praktikaj ekzemploj kaj informo pri propraj spertoj de niaj legantoj instigas al propra pripensado kaj al propra decidiĝo. Mia

celo ja ne estas nur informado, mi ŝatas per tio ankaŭ instigi al propra sintenado, al la formado de sia konduto, al la ĝustigo de sia vojo, al la irado de la ĝusta vojo al la feliĉo.

Ĉiuj estaĵoj estu feliĉaj!